

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

1995:2

HJO '95

NEK TRO GRANDA NEK TRO MALGRANDA



Immigrantfamiljen Berce berikar esperantosveriges kulturliv — alla spelar och sjunger, gärna på esperanto. Här ses Andreo och Natalia med barnen Erik (sångare) och Olesia, som alla medverkade vid kongressen i Hjo. Familjen är ryskspråkig från Lettland och blev statslös och hemlös vid Sovjetunionens sammanbrott.

Foto: Bengt Nordlöf

JARKONGRESO DE SEF

LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694
Majo 1995 • 83-a jarkolekto
Fondita en 1913

Tillf. redaktion/provizora redakcia grupo:

Agneta Emanuelsson
Kaisa Hansen (red. sekreterare)
Franko Luin (teknisk redaktör)
Bengt Nordlöf

Frågor om prenumeration o. dyl.:

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstjörn

Utformning: Omnibus Typografi, Tyresö

Tryck: Rönquist & Co, Sollentuna 1995

Prenumeration 1995: 150 kr. Gåvoprenumeration till utlandet: 80 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08-34 08 00, fax 08-34 08 10

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 1995:

Direktansluten medlem 150 kr.
Famijmedlem (utan tidning) 60 kr. Ungdomsmedlem (max 20 år) 60 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund och får dess tidning *Kvinpinto*.

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Möllevångsgatan 20 B, 214 20 Malmö

Telefon: 040-12 20 29

Postgiro: 578-5

Telefontid: 1 september-15 maj: torsdagar kl. 17-18.
Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Expedition: Wivi Nilsson

Styrelsens ordförande: Tomas Jansson, Storgatan 13,
753 31 Uppsala

TRA LA MONDO

De Informilo al Dua Jarcento

La Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno (IEMW) dum pli ol kvardek jaroj aperigis modestan *Informilon*. Ekde 1995 ĝi aperas kiel interkultura revuo, kvaronjara, sub la nomo *La Dua Jarcento*.

La nova revuo daŭre funkcias kiel informilo de la muzeo, sed ĝi aperigas sur siaj 24 paĝoj ankaŭ informojn pri la esperanto-movado en meza Eŭropo kaj pri esperanto-kulturo.

La Dua Jarcento publikigas ankaŭ beletron.

Pli da Asteriksoj

Antaŭ dek kvin jaroj aperis en Germanio la unua volumo de la fama bildrakonta heroo *Asteriks la gladiatoro*. Pliaj volumoj estis anoncintaj, sed ne aperis.

Nun promesiĝas aperigo de tuta serio da volumoj en Zagrebo, Kroatio, kie ĵus aperis *Asteriks la gladiatoro*, en traduko de Nedeljko Korasiĉ. Ni esperas, ke li same lerte esperantigis Asterikson kiel tion faris la paderbornanoj, eldonistoj de la unua volumo.

Kongreso en Bydgoszcz

"Monda Turismo" elkore invitas al la 5-a Internacia Esperanto-Kongreso, 5-a Eŭropa Esperanto-Forumo kaj festivalo de Muzika Esperanto-Ligo, kiuj okazos en Bydgoszcz - antaŭ la 80-a Universala Kongreso de Esperanto en Tampere. Dum la kongreso, forumo kaj festivalo en Bydgoszcz renkontigos kelcent esperantistoj, kiuj i a spektos kulturalan programon preparitan de artistoj el multaj landoj. La Eŭropa Forumo, por kiu ni invitos senpage po unu preleganton el ĉiu eŭropa lando, ĉi-foje pri-traktos la ĉeftemon "Kunlaborado de urboj en integriĝo de Eŭropo". Dum la aranĝoj oni ankaŭ festos jubileojn: 25-jariĝon de "Monda Turismo" kaj 20-jariĝon de la Internacia Esperanto-Koruso funkcia kadre de MEL. La programon de la kongreso kungvidos Andrzej Grzebowski, Jadwiga Gibczynska kaj Urszula Tupajka, la MEL-festivalon prof. Dimitar Terziev, kaj la Eŭropan Forumon preparas Roman Dobrzynski, Oskar Princz kaj Milan Zvara.

Aliĝo kaj informoj ĉe:

Kerstin Rohdin
Fack 142
579 00 Högsby
Tel. 0491-20461

Pola radio - Esperanto- redakcio

La Esperanto-elsendoj de Pola Radio estas aŭdigataj du fojojn tage sur la jenaj frekvencoj:

15.30 h
31,50m; 41,18m; 41,99m; 48,90m
(9525kHz; 7785kHz; 7145kHz;
6135kHz)
22.30 h
41,90m; 50,00m
(6135kHz; 6095kHz)

La koncerton kun bondeziroj vi povas aŭskulti lunde je 22.30 h kun reaŭskultito marde je la 15.30 h.

Skribu al:

Pola Radio
Esperanto Redakcio
PL-00-977 Varsovio
Poŝtfako-46
Pollando

La partopreno estas senpaga. Vi skribu nur vian nomo kaj adreson, la salutvortojn kaj la nomon kaj adreson al kiu vi salutas.

Ĉina Radio en esperanto dum 30 jaroj

Ĉina Radio Internacia disaŭdigis en esperanto dum 30 jaroj. Ĝi estas unu el la radiostacioj kun esperanto-dissendoj plej vaste aŭdebla tra la mondo.

ĈRI dissendas en pliaj 37 lingvoj.

La esperanto-redakcio aranĝis specialan kunvenon en Pekino por festi sian jubileon, kaj cento da esperantistoj, ankaŭ el eksterlando, venis por gratuli.

La Espero aliĝas al la gratulantoj, eĉ se postfestene.

NEKROLOGO

Artur Andersson

Kun malĝojo ni informas, ke nia majstro ne plu estas inter ni. Li ĉiam alportis varmon, bonhumoron, lertecon, muzikemon kaj vivoĝojon al ni.

Jam en la 30-aj jaroj li esperantigis. En 1987 li estis kunfondanto de nia klubo. Malgraŭ la mallonga tempo, li multon transdonis al ni el diversaj kampoj, interalie historio kaj muziko.

Ni honoras lian memoron.

La Espero estas presata  sur recikligita papero.

Esperanto en Väsby



Kongresaj tagoj en printempe kaj esperantiste verda Hjo

Ĝi venis – kaj pasis. Tro rapide, kiel oni kutimas bedaŭri je la fino de niaj esperanto-aranĝoj, sed la ĉiutago havas ankaŭ siajn postulojn.

Dum tri belaj frumaj tagoj Hjo ĉe Vättern estis nia ĉefurbo. Ne granda, preskaŭ ĉirkaŭbrakebla, sed vere ideala. La betuloj ĵus ekfoliis, kaj betulojn kaj aliajn arbojn oni bele rimarkas en tiu verda urbo, dum tiuj tagoj iom pli verda ankaŭ pro nia ĉeesto.

Ni kongresis por paroli pri organizaj demandoj, pri diskuti la faritan laboron kaj iom plani nian estontecon. Ĉion ĉi ni ankaŭ faris, sed ni ankaŭ amuziĝis, eble pli ol dum iuj aliaj kongresoj.

Pri tio ni devas ĉefe danki al Nataŝa kaj Andreo Berce, kiuj kun du el siaj infanoj venis por muzike distri nin, kaj subita gasto Mikaelo Bronŝtejn el Sankt-Peterburgo, kiu ĝuste dum tiuj tagoj vizitis Svedion.

Bengt Nordlöf, nova nomo en la estraro de SEF, nomis sin mem "eterna rekomencanto" – ĝis kiam li vizitis kurson en Karlskoga

Ne plena centoj da kongresanoj aliĝis al la sveda jarkongreso en Hjo, kiu ankaŭ per tio adaptiĝis al la formato de la urbo. Sed tio neniel malhelpis, ke la diskutoj estis same viglaj kiel kutime.


La vendredon oni uzis ĉefe por konatiĝi kun la urbo kaj la alvenantoj. En la urba biblioteko malfermiĝis ekspozicio de infandeseĝnaĵoj, kolektitaj pere de esperanto. En la hotela akceptejo klubanoj de Väsby starigis siajn belajn informtabulojn. Sed jam la postan tagon tiu ekspozicio migris al la biblioteko, kie ĝi dum kelkaj semajnoj informis la loĝantojn de Hjo pri esperanto kaj tiamaniere dece kompletigis la desegno-ekspozicion.

Iom da distrado estis planita por la vespero. El Skövde venis dancgrupo, kiu prezentis ne la kutimajn popoldancojn, sed kelkajn dancojn, per kiuj la altaj tavoloj de la socio amuziĝis dum la antaŭaj jarcentoj. La ok gedancistoj estis vestitaj en pasintjarcentaj kostumoj.

Nataŝa kaj Andreo Berce donis malgrandan gustumon de sia kantado; la ĉefan parton ili ŝparis por la posta vespero.

Ŝanĝoj en Eldona

La sabataj laboroj komenciĝis per jarkunveno de Eldona Societo Esperanto. La jarkunveno estis rapide pritraktita kaj la nunaj funkciuloj reelektitaj. La tuta estraro konsistas el **Tomas Jansson**, prezidanto, **Bertil Nilsson**, sekretario, **Lennart Lagerkrantz**, kasisto, **Per Aarne Fritzon** kaj **Franko Luin**, estraranoj, **Kaisa Hansen** kaj **Ulf Ribers**, anstataŭantoj.



Kjell Aldsten, la "urbestro" de Hjo, sur la bildo interparolanta kun Roland Lindblom, bedaŭris, ke li ne povas paroli al la kongresanoj en esperanto. Ankorau eblas lerni...

Du gravaj informoj estis donitaj al la ĉeestantoj: aperigo de la kvara parto de *Etimologia Vortaro de Esperanto* de **Ebbe Vilborg** en junio ĉijare kaj, same en junio, translokigo de la librostoko el Malmö al Bromma, kie Eldona luis stokejon. Sekve de tio la deĵorejo en Malmö ĉesos funkcii.

SEF kaj la lokaj kluboj

Sabate antaŭtagmeze komenciĝis ankaŭ la ĉefaj diskutoj de la kongreso: la disvolvado de SEF kaj de la lokaj kluboj.

La enkondukon al la diskutoj faris **Roland Lindblom**. Li skizis la problemojn, per kiuj baraktas multaj kluboj kaj donis plurajn ekzemplojn pri novspeca interesiĝo pri esperanto, pri iniciatoj de unuopuloj en lokoj, kie kluboj ne ekzistas – kaj kie kluboj ekzistas.

Kvin diskutgrupoj formiĝis post la inaŭguro por pridiskuti informadon, organizadon de kursoj kaj de la kluboj mem kaj de agadoj en lokoj, kie kluboj mankas. Tiuj diskutgrupoj laboris ankaŭ en la dimanĉo.

Posttagmeza inaŭguro

Sabate posttagmeze okazis la inaŭguro de la kongreso. Iom malfrue, iuj opiniis, ĉar la kongresaj laboroj jam daŭris dum ioma tempo, sed la inaŭguro antaŭis la jarkunvenon, kiu sekvis tuj post tio.

La inaŭguron ĉeestis **Kjell Aldsten**, prezidanto de la urba konsilantaro, kaj **Per Göran Ylander**, urba arkitekto.

Kjell Aldsten komencis bedaŭrante, ke li ne povas alparoli ni en esperanto, rezulte de kio Roland Lindblom donacis al li iom da studmaterialo. Kjell kaj Per prezentis kelkajn aspektojn de Hjo, kompletigitaj per belegaj kolorbildoj. Rimarkeblis, ke ambaŭ fieras pri la speciala karaktero de Hjo kaj ke ili ĝojas, ke ankaŭ multaj ne-Hjoloĝantoj malkovris tiun karakteron, pro kio la kvanto da turistoj kreskas.


La jarkunveno de SEF

Sub la gvido de **Bertil Nilsson** el Nyköping la reprezentantoj de la kluboj rapide kaj glate pritraktis la tagordajn punktojn. La agado de la estraro estis aprobita preskaŭ sendiskute; plian aprobon signifis la reelekto de granda parto de la asociaj funkciuloj. Nur malgrandaj ŝanĝoj okazis en la estraro: **Per Aarne Fritzon** forlasis ĝin kaj estas anstataŭita de **Jill Hilford**, ĝis nun anstataŭanto. Ŝian lokon ekokupis **Bengt Nordlöf** el Farsta.

Iom da diskutoj okazis pri la proponoj al la jarkongreso. La klubo de Lund sentas grandan bezonon de bona informvideo. Saman bezonon sentas ankaŭ la aliaj kluboj kaj la estraro, kiu estis sekve taskigita realigi tion dum la nuna laborjaro.

Alf Mobark el la klubo de Malmö opinias, ke estas bezonata normigo de la simboloj, kiujn ni uzas por nia lingvo, kaj ekzakta difino, kiu verda koloro estu uzata. Ankaŭ pri tio estis taskigita la es-

SVEDA JARKONGRESO EN HJO



Esperantokapablaj komputoroj ankaŭ ludis rolon en Hjo, ekzemple ĉi tiu, per kiu Karl-Gustaf Gustavsson el Skövde demonstris, kiel havi esperantajn literojn surekrane.

traro, kaj pri havigo de originaloj, kiujn la kluboj povas uzi por siaj informiloj.

Karl Buremo el Jönköping ŝatus, ke la teksto en *La Espero* estu pli granda. El la sekva diskuto montriĝis, ke ekzistas interligo inter la ekonomio de SEF, la amplekso de la gazeto kaj la litergrando. Je rekta demando de la kunsidgvidanto montriĝis tamen, ke la ĉesstantaj membroj estas kontentaj pri la nuna aspekto de la membrogazeto.

Dua propono de la **klubo de Lund**,

titolita "Diskutema lingvisto", atentigis pri la bezono havi organizon, kiu povas rapide reagi al eldiroj kaj artikoloj, kiuj prezentas esperanton erare. La estraro ricevis la taskon aranĝi "reton", kiu povas esti uzata tiucele.

Altlernejo de Karlskoga

Lars Forsman el Karlskoga estis invitita prezenti sian altlernejon pli profunde ol li sukcesis fari pli frue. Li rakontis pri la evoluo de la lernejo ek de la komenca iniciato de sola virino instrui al infanoj de malriĉaj laboristoj kaj kamparanoj, ĝis la nuna moderna altlerneja komplekso sude de Karlskoga.

En sia prelego li prezentis ankaŭ kiel la kursoj estas organizitaj kaj li elektis el la centoj da partoprenintoj kelkajn, pri kiuj li speciale fieras.

Lars Forsman ankaŭ atentigis, ke la estonteco de la esperantokursoj en Karlskoga ne estas certigita kaj ke ĝi dependas de la daŭra interesiĝo pri ili kaj de la subteno de la svedaj esperantistoj – subteno plej bone montrata partoprenante la diversnivelajn kursojn kaj reklamante tiujn kursojn al la membroj, interesiĝantoj kaj konatuloj.

Vespero de familio Berce

La sabata vespero apartenis al **familio Berce** kiu, asistita de **Mikaelo Bronŝtejn**, gajigis la kongresanojn per kantoj, muziko, ludoj kaj dancigo. La repertuaro estis tre vasta, de tradukitaj kaj originalaj kantoj ĝis ĝisosta sveda dancmuziko – vere iom por ĉiuj!


Seriozan parton aldonis **Mikaelo** per prezento de kelkaj rusaj poetoj kaj iliaj verkoj en esperanta traduko.

Kaj fine la fino

Ĉiuj kongresoj iam finiĝas. Sed ankaŭ la dimanĉo sukcesis enhavi vastan aron da programeroj: diservon, kiun aranĝis la sveda sekcio de KELI, kun kantado esperantlingva de **Annika Eklund** el Tibro; daŭrigon de la diskutoj pri SEF kaj la lokaj kluboj – diskuto, kiu ne finiĝis per la fino de la kongreso en Hjo; libroaŭkcion, laŭkutime brile gvidata de **Torsten Lund** el Malmö, kaj la oficialan finon kun dankoj kaj invito al la venontjara kongreso, kiu okazos en **Katrineholm** meze de majo 1996.

Estu bonvena al ĝi jam nun!

Franko Luin



Erik, fem år, med familj

Minsta deltagaren var lille Erik som är fem år gammal och talar esperanto. Han var på kongressen med mamma Natalia och pappa Andrej Berce. Familjen kom till Sverige som flyktingar från Lettland för två år sedan och bor i Vaxholm utanför Stockholm.

–Vi talar tre språk hemma, berättar Natalia Berce. Det är ryska, svenska och esperanto, och barnen som är sju, fem och två år gamla, talar alla tre språken.


Makarna Natalia och Andrej är båda musiker och reser runt i landet med barnen och uppträder. Sångerna sjungs på esperanto.

–Det är tack vare en bekant som skulle på en esperantokongress i dåvarande Leningrad som jag kom i kontakt med esperanto första gången, minns Natalia. Han kunde inte gå på sammankomsten och beordrade mig att representera honom. Jag protesterade för jag kunde inte ett ord esperanto. Ta en bok med dig, sa han och skickade iväg mig.

Det var 1976 och efter tio dagar bland esperantister började Natalia att tala språket. Intresset var fött och det var genom esperanto som hon mötte maken.

–Det är roligt att åka på kongresser och träffa deltagare från andra länder, säger Natalia leende. Det är en underbar livsstil och möjliggör resor världen runt. I Ryssland var esperanto en mycket populär och stark rörelse innan Stalin kom till makten. Nu är det ekonomiska problem som gör att det är svårt att upprätthålla språket i samma utsträckning som det var på 70-talet.

Maja Smolic



Mikaelo Bronŝtejn, nia gasto jam antaŭ du jaroj en Upsalo, per propraj kantoj kaj literaturaj tradukaĵoj riĉigis la vesperajn programojn.

Agneta Emanuelsson havis la lastan vorton en Hjo – bonvenigante al la venontjara jarkongreso de SEF, kiu okazos en ŝia loĝurbo Katrineholm

Ĉiuj fotoj: F. Luin

KLUBO MIL 1995

Ulla Luin, Tyresö
2000 kr
E-klubo de Jönköping
1000 kr
Nils Olsson (testamento) 1000 kr
Sten Broman, Skövde
1000 kr
Leif Nordenstorm,
Boden 1000 kr.
Karl Rönning,
Västerfärnebo
1000 kr

NOVAJ KLUBO CENT

Tore kaj Signhild
Johansson, Kalmar
200 kr
Margit Levi, Nybro
100 kr
Ivar Andersson, Hälleforsnäs 100 kr

NOVAJ DONACIOJ

Anonime al poŝtgiro
200 kr
Brita Rehn, Göteborg,
(memore al Oskar Svantesson)
100 kr

...

SEF kore dankas ĉiujn donacintojn kaj donacantojn. Pliaj donacoj estas bonvenaj al poŝtgiro 20 12-3, Esperanto-forbundet

Suda distrikto

La jarkongreso de Suda distrikto de SEF okazis en Lund la 11-an de marto. Pri la pasinta jaro oni povas rakonti la jenon: Semajnfina kurso okazis 19-20 de novembro en Lund kun sep partoprenantoj.

La plej granda evento dum 1994 estis la jarkunveno de SEF en Åkersberg en Höör, kiun aranĝis la suda distrikto.

La kluboj apartenantaj al Suda distrikto havas ĉ. 230 membrojn. Krome ĉ. 30 personoj estas rektaj membroj de SEF.

Bertil Andreasson estas reelektita prezidanto por 1995. Reelektitaj estas ankaŭ la estraranoj **Lisbet Andreasson** kaj **Gertrud Lund**, novelektita **Sten Svenonius**. Reelektitaj estas la anstataŭantoj **Ann-Christine Krondahl** kaj **Barbro Haraldsson**. Ankaŭ la revizoroj **Bengt Hallin** kaj **Per-Olov Johansson** kaj iliaj anstataŭantoj **Britta Lindberg** kaj **Asta Schaedel** estas reelektitaj.

Post la kunsido **Kerstin Rohdin**, Högsby, parolis pri vojaĝoj laŭ la Balta maro. Dum 15 jaroj ŝi plurfoje vizitis Pollandon kaj la Baltajn ŝtatojn, ĉefe Estonion. Ŝiaj spertoj estas tre variaj komparante la tempon antaŭ kaj post la disfalo de Sovetunio. Ŝi parolis pri la griza impresado de la landoj, kio tamen iom post iom pliboniĝas laŭ tio, kiel la konstruaĵoj kaj iliaj ĉirkaŭaĵoj estas rekonstruitaj. Havante multajn geamikojn en tiuj ĉi landoj Kerstin ricevas esperigajn informojn pri la okazantaĵoj tie, spite al tio, ke la esperantomovadoj suferas pro manko de mono.

La Folio 1995:4

Karlskrona festo

Tridek kvin kantistoj, muzikistoj kaj dancistoj, ĉiuj premiitoj en polaj konkursoj, estis gastoj de la Småland-Blekinge regiono dum regiona renkontiĝo en Karlskrona meze en junio. La renkontiĝo estis aranĝita de **Sam Fritz** kaj **Kerstin Rohdin** kun helpo de la Oskarshamna klubo. La arta programo inkluzivis dancdramon pri la homa situacio, verkita de la dancistoj mem kaj tre lerte prezentita. La muzikistoj kaj la kantistoj estis altkvalitaj.

Grava flankrezulto de la evento estis, ke la publiko ricevis eblecon aŭskulti esperanton per kantoj prezentitaj ĉe konata restoracio en la urba placo, kaj ke la estroj de la turisto-buroo kaj la loka lernejo, kaj aliaj en la publikaj kaj edukaj servoj ricevis pozitivan bildon de esperanto kiel vigla kaj efika ilo por kunlaboro. Artikolo kaj bildo aperis en la loka ĵurnalo.

Harold Brown

Norrköping

Norrköpingsklubben ordnar en utflykt lördag 3 juni: fågelkonsert i skymning-en på gamla soptippen. Anmälan senast 1 juni.

Anmälan: Eva eller Haldo, tel. 011-17 36 87.

TEF 20 år

Tyresö Esperantoförening, en nykomling bland svenska esperantoklubbar, blir snart 20 år och tänker fira sina första två årtionden den 5 juni. Annandag pingst, med picknick och underhållning i **Tyresö slottspark**, från kl. 13.

Ring TEFs sekreterare, **Janko Luin**, tel. 08-712 82 91, för information, vägbeskrivning och anmälan.

Västerås

I Västerås har **Radio Esperanto** fått utökad sändningstid och kan nu höras i 30 minuter varje söndag mellan 16.30 och 17.00.

Radio Esperanto sänder intervjuer, reportage från esperantovärlden m.m. på 93,7 MHz. Sändningarna kan avlyssnas i Västerås med närmaste omgivning.

La VEKa Bulteno 1995:1

Lund

Den 22 april arangerades en intensivkurs i två nivåer: en nybörjarkurs och en fortsättningskurs. Kursledare var **Kjell Persson** och **Bertil Andreasson**.

La Folio 1995:4

Stockholm

Den 8 och 9 april ordnade stockholmsklubbarna gemensamt en intensiv kurs för nybörjare och "rekomentoj" och en fortsättning från kursen den 28-29 januari.

Kaisa Hansen

Kajto i Falköping?

På väg till världskongressen i Tammerfors kommer musikgruppen **Kajto** att passera genom Sverige och eventuellt ge någon konsert på vägen. En ort som vi hört talas om är **Falköping**, där gruppen är tänkt att framträda den 17 juli.

Musikgruppens planer är nu, i början av maj, inte färdigspikade, därför gör du bäst i att kontakta Falköpingklubbens ordförande **Ingvar Eriksson**, tel. 0515-711 221 (10-12, 15-17), och kolla tiden. Det kan bli ett unikt tillfälle att höra dem i Sverige "live" (som man säger numera på ren svenska).

Plurlingva familio

La 8-an de marto la klubanoj de Malmö havis okazon renkonti la tutan familion Svenonius: Beatrix kaj Sten kaj la infanojn Johan, Jasmin kaj Nora. "Ĉefparolanto" estis Beatrix, kiu ĉarme rakontis pri la trilingva familio.

Beatrix lernis esperanton 11-jara de sia patrino hejme en Hungario, sed kompreneble la renkonto kun Sten dum la UEA-kongreso en Budapeŝto en 1983 iĝis la deirpunkto de ŝia vivo kiel esperantisto.

Je la naskiĝo de Johan, nun 9-jara, Beatrix kaj Sten serioze diskutis la lingvajn problemojn. La antaŭjuĝoj de la ĉirkaŭantaro pri enkonduko de tri lingvoj jam de la komenco estis multaj. Sed ili mem kredis al la ideo. Ili decidis fari tiel, ke kiam Beatrix estas sola kun la infanoj, ŝi parolas hungare kun ili, dum Sten, sola kun ili, parolas svede, kaj kiam la tuta familio estas kolektita, ĝi uzas esperanton. En la infanvartejo la infanoj parolas nur svede. Johan nun parolas bonan svedan, normalan hungaran kaj trovas Esperanton plej amuza.

Li facile ŝanĝas inter la tri lingvoj.

Jasmin komencis paroli hungare jam tute malgranda. Je testo por 7-jaruloj, okazigita kiam ŝi estis 6-jara, ŝi bonege povis respondi svedlingve. Ŝi ĉiam respondas en la sama lingvo, en kiu ŝi estas alparolita. Nora ankoraŭ uzas sian "propran" infanlingvon.

Dum vojaĝoj en Hungario ili parolas hungare, sed ankaŭ esperanton kun esperantistoj tie. La tuta familio partoprenis en renkontiĝo por esperantofamilioj en Hungario kun 50 partoprenantoj el 10 landoj. Estas bonega maniero por la infanoj konatiĝi kun aliaj junaj esperantoparolantoj.

Sten diris, ke lingvo estas komunikilo, sed ankaŭ barilo. Ĝi ne ĉiam estas ponto inter homoj.

Johan kaj Beatrix demonstris, kiel flue ili parolas hungare. Juĝante laŭ iliaj manieroj kaj ridoj ili tre bone komprenis unu la alian.

La Folio 1995:4

Impresoj el Jönköping

Fine de marto, kiam en meza Svedio jam komenciĝas la printempo, ni veturis aŭtomobile kvarope. En Leksand kaj Dalekarlio ni lasis blankajn, neĝokovritajn kampojn, montetojn kaj arbarojn, kaj jam kiam ni alvenis al Närke, ni trovis printempon, kun tute sekaj vojoj, sekaj kampoj, kun herbo, kiu komencis kreski, kun jam elkreskintaj narcisoj, kiuj timeme eliris la teron en ĝardenoj, arbaroj sen neĝaj insuletoj. Tie vere estis printempo.

Nia vojo iris grandparte apud la bela, granda lago Vättern, kaj ni ĝuis de la panoramo. Survoje ni ankaŭ iom haltis en la ĉarma urbeto Hjo, kie en majo okazos la Sveda Esperanto-kongreso, kun kongresejo en la hotelo Bellevue, kiun ni ankaŭ mallonge vizitis.

Estas longa vojo al Jönköping kaj ni veturis unue aŭtobuse, poste aŭtomobile, dum preskaŭ ok horoj. Sed dank' al bona ŝoforo ni bone atingis la celon.

Panoramoj – tagaj kaj noktaj

En enloĝiĝis en tre belaj loĝdomoj de Södra Vätterbygdens Folkhögskola, kiu situas alte super la urbo Jönköping, de kie ni havis belegan panoramon al la urbo mem kaj al la granda lago Vättern, kiu similas vere al maro kun sia beleco kaj grandeco. Mi mem tre ŝatis la panoramon, kaj mi ne povas diri, ĉu ĝi estis pli bela dumtage aŭ dumnokte, kiam milonoj da lampoj briletas en diversaj koloroj super la apudlaga urbo.

En la nokto mi vekigis, kaj sidante sur la lito, mi ĝuis tiun belan nokto-briletan panoramon. Tiam mi memoris, ke antaŭ kelkaj jaroj, kiam mi kaj mia edzo partoprenis Esperanto-konferencon en Ateno, ni havis similan panoramon el nia hotela ĉambro (ni loĝis en la sepa etaĝo) meze de tiu grandega urbo. Tiam mi vekigis nokte, sidis sur mia lito, kaj ĝuis rigardante la belegan aspekton de Akropolo, lumigita per fortaj reflektoroj. Tiuj lumoj donis al la Partenonaj ruinoj aspekton de ora templo. Mia edzo kelkfoje vekigis kaj demandis min, kial mi ne dormas. Mia respondo estis: "Dormi mi povas ankaŭ hejme, sed sidi surlite kaj ĝui panoramon de lumigita, antikva Akropolo, tio neniam plu okazos".

Sed, ni revenu al Jönköping. Ni loĝis en studenta domo, kun bonega, luksa komforto. Ĉiu ĉambro kun bano, duŝo, necesejo. (Studentoj tie loĝas nur po unu en ĉiu ĉambro). Ĉambroj grandaj, belaj, helaj, puregaj, kaj la plankoj – pro sia pureco, spegulas.

Programo tre interesa

Ni havis okazon aŭskulti paroladojn de, interalie, la germana profesoro Till Dahlenburg, kiu lerte priskribis uzadon de diversaj lingvoj en lernejoj, studado kaj scienco, kaj paralele uzadon de Esperanto. Same, pri problemoj en la laboro, ke Esperanto estu akceptota, kaj komprenata de la registaroj, de homoj,

de medioj, kien oni enpenetras kun ĝi. Li parolis pri la fakto, ke en la plej progresemaj landoj oni plej multe uzas anglan lingvon; same oni faras en Svedio. Tiel, ke eĉ sciencaj, doktoraj disertacioj, kiuj antaŭe ĉiam estis plej ofte skribitaj en sveda lingvo, nun preskaŭ ĉiuj aperas nur en la angla lingvo.

Instrui en Afriko

La preleganto Attilio Orellana Rojas el Argentino (kun deveno de patro indiana kaj patrino itala) parolis tre interese pri siaj spertoj disvastigi kaj lernigi Esperanton en afrikaj landoj, kun speciala priskribo de la agado en Ganao. Li prezentis siajn spertojn en instruado, kaj konstatis, ke en afrikaj landoj oni ege sopiras lerni, lerni ion, kion ajn; kaj kiam oni anoncis liajn Esperantokursojn anoncis sin pli ol 200 homoj, kaj li ne povis akcepti pliajn. La fakto estas ke en Ganao estas tre malfacile iri al lernejoj. Ĉar por instruado oni devas pagi 22 dolarojn por unu infano, por 6-monata instruado en lernejo. Estas por ili grandega sumo, des pli ĉar la familioj (muslimoj) havas po 6 ĝis 10, eĉ po 30 infanoj, kaj nur la patro laboras, kaj jare gajnas ĉirkaŭ 120 dolarojn. Do, iri al lernejo, kaj lerni skribi kaj legi, por plej granda parto de la infanoj estas nur imagebla, sed ne atingebla.

Li priskribis la vivon tie. Estas grandaj problemoj kun la trafiko. Ne estas vagonaroj. Angloj konstruis ilin, sed kiam ili forlasis la kolonion, ili forportis ĉion, kion ili antaŭe alportis. Do ankaŭ vagonarojn. Restis nur reloj, sed la malriĉa lando povas aĉeti nek vagonojn nek lokomotivojn. Aŭtobusoj ne ekzistas. Do, por pasi grandegajn distancojn, oni uzas aŭtomobilojn. Estas tie 20–30, eĉ 50-jaraj malnovaj aŭtomobiloj. Plej ofte en malbona stato. Ekzemple, sen ŝlosiloj, kaj oni devas funkciigi la motoron kunigante kablojn. Plej ofte sen iaj sidmebloj. Oni sidas sur kartonoj aŭ lignokestoj. Kaj en aŭto por 4–5 personoj oni enpuŝas eĉ 25 personojn. Imagu, kia agrabla veturado en varmo de 45 gradoj kaj pli! (Dumnokte tie neniam estas malpli ol 36°C).

Li parolis ankaŭ pri siaj spertoj en lingvo-instruado en Koreujo, kien li venis nesciante tiun lingvon, kaj kiun li unue devis lerni paroli, legi kaj skribi. Li menciis, ke estis tre laciga laboro, krom la problemoj, kiujn li havis jam ĉe la alveno al la lando. Tuj ĉe la alveno oni forprenis de li ĉiujn librojn, paperojn,

dokumentojn, eĉ la pasporton, kaj li devis ĉion deponi. Do, vi jam povas kompreni sub kiaj kondiĉojn li instruis. Sed, lernantojn li facile akiris. Multaj anoncis sin, eĉ maljunaj profesoroj de universitato. Sed kun ili estis granda problemo. Ili malŝatis, ke al ili instruas junulo, ne edziĝinta kaj sen infanoj. (Laŭ iliaj kutimoj, profesoro devas esti pli maljuna ol liaj lernantoj, kaj nepre havi edzinon kaj infanojn. Kaj tio mankis al li). Tamen, li finfine sukcesis instrui, uzante la Ĉe-metodon.

Li instruis en 40 diversaj landoj de pluraj kontinentoj, kaj liaj spertoj estas grandegaj. Li rakontis ankaŭ pri siaj travivaĵoj, kelkfoje tre amuzaj. Nature, en diversaj landoj kaj kulturoj ne ĉio iras glate.

Brazila ĉiutago

Mi havis ankaŭ okazon aŭskulti junan svedinon el Örebro, Sara Karlsson, kiu faris interesan prelegon kun bildprezentado pri sia interesa, sed ege laciga 6-monata restado en primitiva regiono de Brazilo. Ŝi estis gasto-helpanto ĉe la bieno "Bona Espero" ĉe familio Grattapaglia. Ili kiel ĵus geedziĝinta paro decidis forlasi siajn patrolandojn (li Italian, ŝi Okcidentan Germanion, kie ili kreskis en kompleta komforto kaj alta vivo-nivelo) kaj translokiĝi al Brazilio, kaj tie komenci novan, tre primitivan vivon kaj helpi al malriĉa loĝantaro, kaj precepte al sengepatraj infanoj.

Ilia bieno troviĝas en dezerto, inter savanoj kaj praarbaroj. Kiam ili venis tien, estis neniu domo tie, kaj la plej proksima loĝata loko situis 200 kilometrojn for. Per propraj manoj, kun iom da monhelpo de germanaj amikoj de la edzino, ŝia edzo, (kiu estis intelektulo) konstruis iom post iom, propramane, modestan domon. Poste, ankoraŭ alian, ĉar ili bezonis lokon por bestoj (ĉevaloj, kaproj) por infanoj, por lernejo ... Estis bezonata loko por loĝigi tie, krom la familio Grattapaglia, ankaŭ 35–40 infanojn, en aĝo inter 6 kaj 16 jaroj. Ili faris propran lernejon, kaj ambaŭ estis iliaj instruistoj. Ili instruis al la infanoj, krom skribadon kaj legadon, ankaŭ Esperanton, geografion, matematikon, historion, sciencojn ktp. Krome, ili instruis al ili kiel fari hejmajn taskojn: kuiri, purigi, labori en ĝardeno, kulturi verdaĵojn kaj diversajn kreskaĵojn ktp.

La posedanto de la bieno propramane sukcesis fari primitivan, sed funkci-

DELEGITA RETO

SEF sendis antaŭ nelonge enketilon al la delegitoj de UEA.

Multaj jam respondis al la demandoj sur la enketilo, sed restas kelkaj, kiuj ankoraŭ ne sukcesis resendi la folion. SEF ŝatus kiel eble plej baldaŭ ricevi ĝin ankaŭ de ili.

antan akvokondukilon, sed elektro mankas. Pere de baterioj oni havas malfortan lumon dumnokte en la domo. Sed neniam elektrajn aparatojn eblas uzi: ne lavmaŝinon, ne fridujon, ne frostujon, ne akvovarmigadon. Ĉiujn vestojn oni lavas permane, en malvarma akvo, kio ne estas facila laboro. Se oni en ĵinso sidigas sur la ruĝa tero, poste ne estas eble forlavi la makulojn pere de malvarma akvo. Kaj kuiri en kuirejo kun ĉirkau 40 gradoj da varmo?

200 kilometroj signifas problemojn

Vi povas imagi, kiajn problemojn donas la 200-kilometra distanco al plej proksima loĝata loko. Dum pluraj jaroj la mastroj, kelkfoje nur la mastrino, devis rajdi ĉevalo por atingi urbeton. Kaj por ŝirmi sin kontraŭ sovaĝaj bestoj, ŝi devis esti armita per grandaj tranĉiloj kaj pafilo. Oni ja devas kelkfoje iri al loĝata loko por havigi medikamentojn, kaj aliajn gravajn bezonataĵojn. Kaj Ursula devas esti ne nur dommastrino, instruistino, sed ankaŭ kuracistino, apotekistino ktp. Kaj ŝi sukcesis en tiuj taskoj. Ili ricevas, de tempo al tempo, helpon el Germanio, uzitajn vestojn por si kaj la infanoj, hejmajn ilojn kaj bezonataĵojn, kaj ili tiel konstruis sian "neston". Tiel ili povas vivi tie, sed tre modeste kaj primitive. Sed ili helpis al multe da infanoj sen gepatroj kaj kontribuis multe al disvastigo de Esperanto. Ĉar tiuj infanoj ofte, post kiam ili lasis la bienon atinginte la aĝon de 16 jaroj, ankaŭ mem instruas pliajn infanojn en Esperanto.

Neparolebla interlingvo

Profesoro Hartmut Traunmüller parolis pri la temo: "Esperanto kaj interlingvistiko". Li menciis inter alie strangan kreaĵon: "interlingvon", kiu havas novajn literajn signojn por interkomprenigi diversparolantajn naciojn. Sed tiu "interlingvo" ne estas parolebla, nur skribebla. Sekve ĝi ne povas esti konkuranto al Esperanto.

Estis vere interese aŭskulti la diversajn prelegojn. Kaj inter tiuj venis paŭzoj, dum kiuj ni ĉiam ricevis bongustan manĝon, laŭ sveda bufedo-kutimo (ke oni prenas, kion oni volas kaj kion oni volas...) Kaj en preskaŭ ĉiu dua horo venis tiuj paŭzoj kun bona manĝo, aŭ kun diversaj trinkaĵoj kun kukoj ktp.

Ankaŭ la vetero estis tre taŭga, kaj vere printempa. Ni ja havis feliĉon, ĉar jam la venontan tagon, post nia reveno, venis tia terura "januara neĝo-ŝtormo", kian ni ne vidis dum la tuta vintro. Kun malvarmo, neĝo, ke ne eblis purigi la vojojn, ĉar la vento ĉiam alportis novan neĝon. Neniaj ĝis nun mi vidis tian neĝoveteraĉon en Svedio.

Ni tamen havis bonŝancon, ĉar ĉio iris glate kaj laŭplane. Kaj ni povas daŭrigi nian Esperanto-agadon.

Vera Persson
Leksand

Hjälp Lutombo Yugolelo till Tammerfors och Sverige

För esperantorörelsen, både här i Sverige och internationellt – och särskilt i länder där ekonomin är svag – fungerar besök till och från lite exotiska länder som stimulerande vitamininjektioner. Min egen förhoppning är att det skall finnas intresse att stödja fler besök från den del av världen som ligger mitt hjärta nära, dvs. Afrika. Redan i år, efter kongressen i Tammerfors, hoppas jag och Hans Bakker, som ansvarar för *Fonduso Afriko*, att vi i Sverige skall vara beredda att ta emot en ny gäst.

Lutombo Yugolelo, som det nu handlar om, är inte helt obekant. De som abonnerade på *Oriente Stelo*, den lilla östafrikanska tidskriften som kom ut under några år, kanske känner igen namnet. Yugolelo var redaktör och skrev en stor del av materialet. Efter några år som flykting i Tanzania och Uganda, bor han sedan 1990 i sin hemstad Bukavu i Zaire. Trots otroligt svåra förhållanden i ett land där intet mycket fungerar, har han arbetat energiskt med flera olika projekt för att kunna överleva och dessutom haft tid att un-

dersa i esperanto. En av Yugolelos artiklar kan läsas i tidigare nummer av *La Espero*.

Varje år har *Fonduso Afriko* kunnat bjuda en eller flera afrikaner till *Universala Kongreso*. Deras vistelse har möjliggjorts och förlängts genom att många människor ställt upp med bidrag i olika form: pengar, kost och logi, eller resor. Inför årets kongress i Tammerfors startar nu en insamling av pengar för Yugolelos räkning.

Stockholmsklubben ställer sitt postgiro – 544 54-4, till förfogande. Inbjudningar, t. ex. resa i bil från Tammerfors till Stockholm, kan sändas till

Anita Dagmarsdotter
Terminkursen
Sandö U-centrum
874 02 SANDÖVERKEN

(fo m 1 juni: Mariehamngatan 18,
164 79 KISTA).

Tänk på ordspråket "Många bäckar små gör en stor å".

Anita Dagmarsdotter

MARGÈNE

33-jara poeto, filozof kaj pentristo, komencanto pri esperanto, deziras korespondi por pliboniĝi.

S-ro Mejdoub KALAI
Bât F, N° 33
Diar-el-Hana
27000 Mostaganem
Algerio

•••

Vojaĝo kaj tendumado en Mongolio. Se tio interesas vin, petu pliajn informojn de:

B Ojuma,
College of
Commerce &
Business,
Ulaanbaatar – 48,
Mongolio

•••

Pensiita 62-jara lingvo-instruisto de la angla deziras korespondi kaj intersanĝi poŝtmarkojn.

S-ro Sri Soedono Pr.
Jl. Suryoutran 41
Yogyakarta 55131
Indonezio

Gör en insats!

Esperantoförlaget behöver öka sitt andelskapital för att ge ut nya läro-, ord- och läseböcker, romaner, bokkassetter mm.

Du kan hjälpa till – antingen genom en egen insats eller genom att få din förening engagerad! Det finns

andelsbevis till värdet av

500, 1000 och

10 000 kronor. Din

förening, och du

själv, får teckna hur

många bevis som

helst.

Esperantoförlaget
Möllevångsgatan 20 B
214 20 Malmö
postgiro 578 - 5



Pli da vario

Ankaŭ ĉi-foje ni proponas tradukekzercon, kiun ni taksas pli facila ol multaj el la pli fruaj. Nia intenco estas estonte iom pli variu la nivelon de malfacileco, por ke pli multaj legantoj malhezitu partopreni.

Povas esti, ke iuj sekvas la rubrikon, sed ne alsendas siajn tradukaĵojn. Ankaŭ tiel estas tute bone, sed ni tamen volas atentigi pri tio, ke ne temas pri ia konkurso. Do ne gravas perfekteco, sed tio, ke la klopodoj traduki malkaŝas malfacilaĵojn kaj lingvajn problemojn, kiuj tuŝas ĉiujn uzantojn de la lingvo. La alsenditaj tradukaĵoj ebligas al ni diskuti tiujn problemojn en la gazeto, kaj el tio ni ĉiuj lernas ion. El tiu vidpunkto relative malsukcesa provo povas esti eĉ pli valora ol tute perfekta traduko!

La ĉi-foja teksto estas el lernolibro por radi-ĵurnalistoj. Traduku ĝin en naturan Esperanton, kaj sendu vian tradukon antaŭ la 10-a de junio al: Bertilo Wennergren, Sannadalsv. 4, 117 65 Stockholm.

"Talmelodi

I vanlig konversation varieras vi talmelodin. Vi kan vara lågmälda, fåordiga och sävliga, men meningarna låter inte likadant. Det ska de inte göra i radio heller.

Vi har till exempel den tråkiga vanan att ständigt höja rösten mot slutet av meningen. Det ger hela framställningen ett drag av uppräknings och det är nog sällan meningen.

En annan ovana är att sänka rösten mot slutet av meningen. Innehållet blir svårt att uppfatta när rösten tonar ut i ett lågt mummel. Därtill lockas lyssnaren ofelbart till sömn när sådana försvinnande meningar radas på varandra i en lång följd.

Jag tycker mig ha iakttagit att i hårt matade magasinprogram programinslag ofta avannonseras i ett mummel, som om det vore ointressant att tala om vilka röster man nyss har hört. Mumlar na borde veta bättre!"

(El la libro "Radioresonemang om lyssnare och programarbete" de Ingvar Lundin)

Do ĝis venontfoje kaj bonan sukceson!

Per Arne Fritzon
Bertilo Wennergren

Sube sekvas propono de traduko de la teksto en La Espero 1/95. (Ĝi estas kompilita el esprimoj el la alsenditaj tradukaĵoj, krom en tiuj okazoj, kiam ni havas fortan motivan rekomendi alian vortu-

mon.) Oblikva streko (/) apartigas du aŭ pliajn alternativajn tradukojn de esprimo aŭ frazo. Angulaj krampoj, kiel en "lernejestr[in]o", montras eblan sed ne devigan aldonon. La ciferoj referencas al la subaj komentoj. (Se vi malkonsentas pri io, ni bonvenigas viajn reagojn!)

Bruanta lavejo

Mi loĝas [tuj] super [komuna] lavejo, kiu tiel bruas malfrue en la vesperoj, ke mi ne povas dormi / kies malfruvespera bruado malebligas al mi dormi. Laŭregule oni rajtas lavi nur ĝis la 21-a horo, sed ĉar la kurento/elektro tiam ne estas rompita/elsaltita/malsaltita {1}, homoj kaptas la okazon lavi ĝis malfrue en la noktoj.

Mi kontaktis mian luiganton ([kiu estas] privata domposedanto {2}), kaj proponis, ke li instalu horloĝon {3}, kiu rompu la kurenton je la 21-a, sed nenio okazas. Kion mi povas fari? Mi aŭdis, ke oni havas rajton de re-dukta lupago, se oni loĝas [tuj] super lavejo. Ĉu tio estas vero?

1. Pli libere kaj pli facile eble: "ĉar tiam la elektro daŭre fluas".
2. La esprimo "privatvård" kontrastas al "allmännyttan". Tiu distingo eble estas pli kutima en Svedio ol en multaj aliaj landoj. Eble necesus pli detala klarigo por ne-svedaj legantoj.
3. Jen kelkaj alternativoj por esprimi la svedan "timer": (horloĝa) interuptoro, (horloĝa) memsaltilo, ŝalthorloĝo, tempoŝaltilo.

PAF & BW

Falska vännar 2

Här fortsätter serien om falska vännar (ord som inte betyder vad man kunde vänta sig). Temat denna gång är "yrken och personer".

Varför finns det då falska vännar? Orsaken är för det mesta att internationella ord ofta bara är internationella till formen, men inte till betydelsen. Olika språk ger olika betydelse åt likadana (eller nästan likadana) ordformer. Esperanto använder förstas mängder av internationella ord, men måste bestämma sig för vilken betydelse som ska gälla. Ibland stämmer betydelsen med svenskan, ibland inte. Det är inte mycket annat att göra än att se upp, och aldrig ta för givet att ett ord betyder vad det ser ut att betyda.

ekonomo = förvaltare, hushållare

"Ekonom, person som sysslar med ekonomi" = *ekonomiisto*. "National-ekonom" = *ekonomikisto*. "Ekonomi" i allmänhet = *ekonomio*. "Ekonomi som vetenskap, nationalekonomi" = *ekonomiko* (eller *politika ekonomio*). "Företagsekonomi" = *entreprenadekonomiko*.

fotografo = fotografering

"Fotograf" = *fotografisto*. "Fotografiera" = *fotografi*. "Fotografi, foto" = *fotografajo*. Det finns också en kortform av ordstammen, men den används lite annorlunda: *foti* = "fotografiera", *fotado* = "fotografering", *fotisto* = "fotograf", *foto* = "foto". De korta formerna är nog att föredra, dels för att de är kortare, dels på grund av att *fotografajo* ofta används fel istället för *fotografisto*. Även ordet *fotografio* finns = "fotografering, fotograferingskonst". *Fotado* och *fortarto* är dock tydligare.

konsulto, konsultado = konsultation, förfrågan

"Konsult, rådgivande specialist" = *konsilanta specialisto*. "Konsulent, rådgivare" = *konsilisto, konsilanto*. "Konsul, chef för konsulat" = *konsulo*.

kuratoro = förmyndare, god man

"Kurator" (typ av socialarbetare) = *oficisto pri (socia) bonfarto*. "Kurator, ordförande i studentnation" = *prezidanto (de studenta korporacio)*.

mastro = husbonde, (hotell)vård, (vårdshus)vård

"Mästare, mästare, skicklig person, utlärare hantverkare, läromästare, vishetslärare, stor artist" = *majstro*. "Mästare, segrare i sporttävling" = *ĉampiono*, som även betyder "förkämpe". "Vård, person som någon är gäst hos" = *gastiganto*. "Vård, hyresvård, husägare" = *domposedanto, dommastro, loĝejmastro, luiganto*.

EN JUNIO APEROS

Volumo 4 (N - R) de

ETIMOLOGIA VORTARO DE ESPERANTO

Antaŭmendu!

de Ebbe Vilborg

Prezo: 150 kr plus sendkostoj

Eldona Societo Esperanto
Möllvängsgatan 20 B · 214 20 Malmö
Poŝtĝiro 578-5

mimo = mimare, (panto)mimartist
"Mim, pantomim" = *mimado* eller *pantomimo*. "Mimartist" kan också heta *pantomimisto*. Observera att mimo = "(panto)mimartist", medan *pantomimo* = "pantomim". *Mimiko* betyder "mimkonst". "Mimik, minspel" = *mien(far)ado*.

notario = notarius publicus
"Notarie" = *protokollisto, (tribunala) sekretario*.

rektoro = universitetsrektor, gymnasiesektor
"Rektor" i allmänhet = *lernejestro*. Ordet *rektoro* behövs förmodligen inte alls. *Gimnaziestro* och *universitatestro* är tydligare.

servisto, servistino = tjänare, tjänarinna
"Servitör, kypare, servitris" = *kelnero, kelnerino*.

stenografo, stenografado = stenografering, stenografi
"Stenograf" = *stenografisto*. "Stenografi" (teckensystemet och konsten att använda det) = *stenografio*. "Stenogram" = *stenografajo*. Eftersom stenografo så lätt används fel är det bättre att använda den kortare ordstammen STEN: *steni* = "stenografera", *stenisto* = "stenograf", *steno* = "stenografi", *stenado* = "stenografering".

studento = studerande vid universitet eller högskola
"Student, person som avlagt studentexamen" = *abituriento*. "Studentexamen" = *abiturienta ekzameno*.

vikario = pastoratsadjunkt
"Vikarie, ställföreträdare" = *anstataŭanto*. "Vikarierande lärare" = *anstataŭa instruisto*. "Pastoratsadjunkt" kan också heta *helpa pastro*. *Vikario* används dock även i uttrycket *La Vikario de Kristo* = "Kristi ställföreträdare" (påven).

Bertil Wennergren

VOJAĜANTOJ

Nord-suda vojaĝo

De Helsingfors al Kaŭnas vojaĝis Kerstin Rohdin kaj Harold Brown en la lastaj du semajnoj de aprilo. Nia unua celo estis partopreni seminarion ĉe Borgå (Porvoo), organizitan de finnaj esperantistoj, pri nordaj fabeloj. Kontribuintoj prelegis pri H C Andersen, Tove Jansson kaj la fratoj Grimm. Kerstin prelegis pri Astrid Lindgren. La seminario provizis eblecon denove renkonti finnajn esperantistojn kaj lerni iom pli pri la lingva situacio en Finnlando. Ni vizitis svedlingvan/anglalingvan lernejon en Helsinko, kie ni parolis pri Esperanto. De Helsinko ni iris boate al Tallinn, renkontis amikojn kaj kaptis la okazon viziti la urbon Habsalu kaj la svedlingvan lernejon ĉe Nuckö. Post Tallinn sekvis Pärnu, Viljandi, Tartu. Riga kaj fine Kaŭnas en Litovio. En ĉiu loko ni prezentis programojn en

Esperanto. En la altlernejo ĉe Kaŭnas Harold parolis kun la studentoj pri la nuna situacio ekonomia en Anglio.

De Kaŭnas ni vojaĝis al Bydgoszcz por renkonti la musikistojn kaj la danco-grupon, vizitontaj Karlskrona-n kiel gastoj dum la Småland-Blekinge regiona renkontiĝo. En Bydgoszcz atendis surprizo. Ĝuste tiam okazis tie semajno de prelegoj sub la aŭspicio de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) de San Marino. Tiel eblis al ni partopreni ege interesan programon pri la lingvoscienco, kaj pri la rilatoj inter la individuo kaj la socio (tre aktuala temo en orienteŭropaj landoj). La vizito, krom esti plezuro, refreŝigis niajn kontaktojn kun Finnlando kaj la baltaj landoj.

Harold Brown

Teatro kaj radio

Du vizitantoj el Svedio, Kerstin Rohdin kaj Harold Brown, estis gastoj de Jerzy Fornal kaj Zofia Banet-Fornalova en Raszyn, Pollando, la 6-an ĝis la 16-a de februaro, 1995. La 6-an vespere ambaŭ ĉeestis la Esperanto-Teatron "Espero" kie Jerzy Fornal prezentas monate esperantajn teatraĵojn. En tiu okazo li prezentis al ĉirkau dudek spektantoj, la teatraĵon "Vagabondo".

"Vagabondo" estas unu el la teatraĵoj en "Eduk Danĝera", ĵus eldonita selekto el la teatraĵoj de Harold Brown. En la 8-a posttagmeze ambaŭ estis intervjuitaj de redaktoro Barbara Pietrzak por la Esperanto-elsendo de la

Pola Radio. Kerstin parolis pri sia turisma laboro, aparte en Pollando, kaj sia traduklaboro pri la verkoj de la sveda verkistino Astrid Lindgren. Harold parolis pri sia verkado en Esperanto por la teatro, kaj pri sia nova libro "Eduk Danĝera". Ambaŭ vizitis la Varsovian Esperanto-Klubon kaj renkontis ĉirkaŭ 30 klubanojn. De la 9-a ĝis la 13-a Kerstin vizitis la aktorinon Jadwiga Gibczynska en Krakovo. Poste ŝi vizitis fotografian klubon en Raszyn kaj Harold vizitis lernejon kaj parolis al studentoj en la 8-aj klasoj pri lingvaj problemoj.

Harold Brown

FRIMÄRKEN FOR UEA

Att samla in använda frimärken är ett av de sätt, på vilket UEA försöker få in pengar till olika projekt. Du som har sparat frimärken under året kan ta med dem till Tammerfors och där överlämna dem till UEA.

Jan Ströenne

ÄNNU I TID FOR TAMMERFORS

Om du skyndar dig kan du fortfarande vara med på världskongressen i Tammerfors. Se sidan 6 i förra *La Espero* för gällande avgifter.

Anmälningsblanketter från Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl. 455, tel. 0415-501 52.

Betalning till Esperantoförbundet, Specialkonto, postgiro 14 74 29-5.

Ĉiu abomenaĵo trovas sian adoranton.

[ETT ORDSPRÅK PÅ ESPERANTO SATT MED TYPSNITTET PERSONA. TECKNAT AV FRANKO LUIN 1995]



OMNIBUS TYPOGRAFI: Formgivning, fotosättning och rippning.
Produktion av allehanda trycksaker på svenska, esperanto och andra språk.

OMNIBUS · Box 135 · 135 23 TYRESÖ · TEL. 08-742 83 36 · FAX 08-712 39 93

POEMO

Kiel koni
la sunon, kiu brilas,
la florojn, tiel belajn,
la arbojn verdajn,
la stelojn, sur la ĉielo
de la nokto,
la birdetojn mirindajn,
de printempo

kiel koni tion
sen miaj okuloj?

Silvi, 9-jara

El I.C.E.M. Esperanto nro 73

Ne nur supersignoj...

Dum la lastaj monatoj aperis en la esperanto-gazetaro anoncoj pri Ĉapelilo, kiu prezentas sin kiel io tiel unika kiel tekstprilabora programo en esperanto. Tio kompreneble vekas intereson ĉe ĉiu esperantisto, kiu uzas komputoron.

Ke oni povas skribi esperanton per komputoroj kaj havi la supersignitajn literojn kaj surekrane kaj surpapere estas jam ordinara administrado: ĉiu tekstprilabora programo en Macintosh kaj PC/Windows kapblas tion, se oni elektas tiparon, kiu enhavas esperantajn literojn. Ĉapelilo promesas, ke ankaŭ la surekranaj dialogoj kaj menuoj estas en esperanto, kaj tio jam estas pli ol diversaj "word"-nomaj programoj kapblas. Mi decidis pli detale rigardi la esperantajn.

Komputoro:

IBM-kongrua kun Windows 3.1 aŭ pli posta versio

Procesoro:

minimume Intel 386

Prezo:

DEM 205 (kun sendkostoj)

Adreso:

Professional Consulting
Am Füllgarten 4
D-61250 Usingen
Germanio

Tri disketoj kaj du paperfolioj alvenis el Germanio, kun priskribo, kiel instali la programon. La unua paŝo, la instalado, estis relative facila, malgraŭ kelkaj ne tuj kompreneblaj fakesprimoj, kaj post klicko al la ikono de Ĉapelilo aperis malplena "paĝo". Super ĝi estas du vicoj da simboloj, kiujn oni rekonas el aliaj similaj programoj. Plej supre videblas la menuaro (Datumaro, Redakto, Tiparo, Arango, Enshovo, Fenestro, Literumo, Helpo), sub ĝi dudeko da simboloj, per kiuj diversaj funkcioj estas rapide alireblaj, kaj plia vico da simboloj, per kiuj oni povas difini aŭ ŝanĝi la aspekton de la teksto.

Se vi ne scias, kion la simboloj signifas, tuŝu ilin per la pinto de la sago, kiun vi stiras per la klikmuso, kaj aperos informo, kion ĝi aktivigas. Tio validas tamen nur pri la unua vico da ili. La simboloj sur la dua vico estas pli facile kompreneblaj.

La menuaro ne montras supersignitajn literojn, sed uzas 'h' (Arango, Enshovo). Tio estas pro limigoj de la sistemo. La mesaĝoj kaj la helpoteksto tamen havas la ĝustan aspekton.

Helpo, eĉ relative abunda, estas havebla sub propra menuero. Komencu nepre per ĝi, ĉar tio estas la sola loko, kie vi ricevas klarigojn pri la diversaj funkcioj. Surpapera priskribo ne estas havebla, almenaŭ ne ankoraŭ.

Cetera la funkcioj de Ĉapelilo egalas al tiuj de similaj komputoraj programoj kaj mi ne detale priskribos ilin. Vi povas ŝanĝi la aspekton de via teksto, serĉi kaj anstataŭigi literojn, vortojn aŭ frazojn, aldoni bildojn, printi dokumentojn...

Supersignitaj literoj

Sed ni venu al la partoj, kie ĉi tiu programo estas speciala. Unue la maniero skribi la esperantajn literojn: vi premas la regan klavon (ctrl) kaj la supersignotan literon. Se vi elektis tiparon, kiu komenciĝas per *Esp*, vi ricevos la esperantan literon. Ĉapelilo venas kun multaj preparitaj tiparoj (eĉ se pluraj el ili ne speciale uzindas).

Se vi jam pli frue uzis komputoron por viaj tekstoj, vi povas "importi" tiujn tekstojn al Ĉapelilo. Se vi skribis la supersignitajn literojn kiel *ch*, *cx* aŭ *c^*, vi povas ricevi ilin aŭtomate en la ĝusta

aspekto sur la ekrano. Mi provis tion kaj tio funkcias tute elegante.

Se vi bezonas doni viajn tekstojn al iu, kiu ne uzas Ĉapelilon, vi povas "eksporti" ilin koditaj per *h*, *x* aŭ *^*. Sed pri ambaŭ funkcioj estus vere bezonata priskribo, kiel prepari la dokumentojn, por ke tio funkcii kiel eble plej glate.

La tiparoj en Ĉapelilo ne uzas la saman kodon por la supersignitaj literoj kiel mia *Publika*, kiun iuj uzas en Svedio. Nova versio de *Publika* (nomata *Esp Publika*) estos aldonita al Ĉapelilo. Ŝanĝo de unu al alia versio de *Publika* postulas manan rekodigon, t. e. uzon de la "trovu/ŝanĝu"-funkcio.



Kontrolas vian literumadon

Ne nur tiparoj venas kun la programo, sed ankaŭ esperanta vortaro, kiun Ĉapelilo uzas por literumkontrolo. Mi estas relative lerta tajpanto, sed okazas, ke literoj venas en erara ordo (ofte mi skribas *espernato* anstataŭ *esperanto*) aŭ ke litero mankas. Mi devas ĉiam regli la tekstojn por trovi tiajn misojn.

Ĉapelilo povas fari tiun "relegon". Ĝi kontrolas, ĉu la vorto ekzistas en la vortaro. Se ne, ĝi informas pri tio kaj oni povas korekti la vorton, se erara, aŭ – se korekta – aldoni ĝin al la vortaro, tiel ke Ĉapelilo rekonu ĝin venontfoje. La vortaro estas riĉa je minimume 120 000 vortoj, kaj ĝi akceptas kiel korektaj, ekzemple, *juna*, *junan*, *junaj* kaj *junajn*, kaj similaj verbojn (-as, -is, -os), sen ke ili estu en la vortaro en ĉiuj variaĵoj.

Se vi aldonas vorton al la vortaro, ĝi aldoniĝos ne en la formo en via teksto (ni supozu, ke temas pri *paneos*), sed en sia baza formo (*panei*) kaj kelkdeko da derivaĵoj (*paneadi*, *paneanta*, *paneinta*, *paneonta*, *ekpanei*...). Post nelonge vi havos vortaron, kiu respegulas vian lingvuzon kaj povos eĉ pli rapide helpi vin.

Se vi misliterumis tiom, ke vi eĉ ne memoras, pri kiu vorto temas, vi povas peti proponojn de Ĉapelilo. Sed tio povas esti temporaba, depende de la rapideco, je kiu via komputoro laboras. Mi petis proponojn pri mia misliterumo *espernato* kaj ricevis – post kvin minutoj! – 49 diversajn proponojn, inter kiuj ankaŭ la korektan *esperanto*. Sed mi vere ne havas rapidan komputoron. En alia kazo la serĉado daŭris unu minuton.

Ankaŭ dum vi skribas

Plej grandan utilon de Ĉapelilo vi havos, se vi igas ĝin kontroli vian literumon, dum vi skribas. Post ĉiu mise skribita vorto vi aŭdos pepon kaj povos tuj kontroli, kiun eraron vi faris kaj korekti ĝin. Mi kredis, ke tiu funkcio malrapidigos la skribadon, sed la reago estis ĉiam tuja.

Vi aŭdos pepon ankaŭ post ĝuste literumitaj vortoj, kiuj mankas en la vortaro (plej ofte temas pri vortkombinoj). Daŭrigu skribi, sed kontroligu la tekston, kiam vi estas preta, kaj aldonu la vortojn al la vortaro.

Ĉapelilo povas kontroli viajn skriberojn, sed ne la lingvajn erarojn. Tion ankaŭ aliaj similaj programoj ne kapblas fari. Se vi forgesis aldoni -n aŭ aldonis ĝin troe, vi ne kulpigu pri tio la komputoron...

Unu ĝena manko

Estas unu ĝena manko en Ĉapelilo kaj ĝi koncernas la esperantistojn loĝantaj en norda Eŭropo: la sveda/dana/norvega litero *ä* ne estas havebla (ankaŭ ne la dan-norvega *æ* kaj *ø*). La programisto, kiu estas Simon Payne el Usingen apud Frankfurt, devis forigi kelkajn literojn por aldoni la esperantajn. Ĝi estis unu el la literoj, kiuj malaperis.

Se vi povas havi *ä* en via teksto: vi elektu neesperantan tiparon por ĝi (aŭ la originan *Publika*). Ne tre eleganta solvo, sed ebla.

Malgraŭ tiu manko kaj kelkaj etaj malgataĵoj mi ŝatus rekomendi Ĉapelilon al svedaj esperantistoj, kiuj uzas IBM-kongruajn komputorojn. Ankaŭ la prezo, malgraŭ la nuna alta kosto de la germana marko, estas favora: apenaŭ iom pli ol 1000 svedaj kronoj.

Kaj nenio malhelpas, ke vi uzu ĝin ankaŭ por viaj svedaj tekstoj. Nur memoru uzi neesperantan tiparon.

Franko Luin

Hitler, Maŭ, Strindberg kaj mi

Mi naskiĝis en eta fiŝista haveno de sudorienta Svedio. Antaŭ nia ligna domo – verda, kompreneble – troviĝis gruza strateto, trans kiu etendiĝis retsekiĝa kampo, kaj ankoraŭ transe situis estis fiŝistoj, sed miaj gepatroj ne. Paĉjo estis mekanlaboristo, kaj Panjo – nu, en la kvindekaj jaroj, dum mia knabaĝo, ŝi estis simple panjo!

Mi tamen devas retroiri el tiuj idiliaj kvindekaj jaroj en sveda urbeto ĝis la tridekaj jaroj en Germanio, pri kiuj la vorto idiliaj eble ne estas la plej trafaj. Tie vivis juna viro, esperantisto, kies familia nomo estis Levi. Ĝuste en mil naŭcent tridek tri, kiam certa ekskaporalo suriris iom tro grandan podion, tiu junulo ial ekhavis la ideon forlasi sian patrolandon kaj migri norden al Svedio. Sama ideo trafis multajn aliajn homojn kun similaj familiaj nomoj. Kiel lia plano povis efektiviĝi, mi ne scias, ĉar tiu epoko la naciaj aŭtoritatoj kaj la edukitaj, altmoralaj intelektuloj de mia lando ne emis "enlasi fremdajn elementojn en la nordan popolan korpon". Mi ankaŭ ne scias, ĉu helpis aŭ malhelpis al nia junulo, ke li enamiĝis kaj edziĝis al knabino el la sudsveda provinco Skanio. Ĉiukaze, fine de la tridekaj jaroj ni retrovas lin en la provinco Smolando, kie li instruas al mirantaj smolandanoj artefaritan internacian lingvon. Lia instruado dum kelka tempo tre prosperis, kvankam pro internaciaj eventoj, kiujn mi ne menci- os tie ĉi, dum kelkaj jaroj ne plu eblis korespondi k.ĉ.l. p.ĉ.t. aŭ interŝanĝi b.k. k.t.p.

Inter la lernantoj de nia "fremda elemento" troviĝis juna laboristo el la urbo Kalmar kaj junulino el la apuda kamparo. Ili ambaŭ estis de malriĉa familio, kio en tiu epoko signifis, ke la publika lerneja sistemo neniam instruis al ili fremdan lingvon. Nur en la liceoj oni donis al infanoj el "bonaj familioj" sciojn de la plej grava fremda lingvo – la germana. Por la du gejunuloj la esperantolecionoj de sinjoro Levi do promesis malfermi fenestron al la mondo. Amaso da svedoj tiuepoke kolektiĝis ĉirkaŭ tiu bela revo. Por multaj ĝi fariĝis nur efemera kaprico, sed niaj du gejunuloj estis seriozaj, studemaj homoj, kiuj efektive realigis sian revon post la fino de tiuj internaciaj eventoj, kiujn mi jam aludis. Ili renkontiĝis en la esperanto-kurso, kaj krom ebligi internaci-

ajn kontaktojn, la kurso havis ankaŭ kelkajn kromefikojn, el kiuj mi estas unu. Tial, eĉ se tio povas aŭdiĝi frivole, mi atribuas al ekskaporalo Hitler la respondecon pri tio, ke mi naskiĝis en esperantista hejmo, kaj eĉ pri tio, ke mi entute naskiĝis!

La fiŝista haveneto de mia frua infanaĝo situas sur duoninsulo en la Balta Maro. La nomo de tiu terpinto estas *Ŝtoninsulo*, kaj sekve oni baptis min *Ŝtono* – aŭ ĉu male la loko estas nomita laŭ mi? Mi fakte ne scias. Ĉiukaze, jam frue en mia vivo nia verda domo estis vizitata de esperantistoj diverslandaj, sed – ĉu domaĝe, ĉu feliĉe – mi preskaŭ nenion memoras de tio. Restis en mia konscio nur la vizito de onklino Andrée el Francio, kaj eĉ de ŝi mi memoras ĉefe Ĉevalon. La onklino donacis al mi molan beston, ĉevaleton faritan el pecoj da flava vakstolo, kunkudrita per ruĝaj L-formaj steboj kaj plenigita per vato. Ŝi prezentis ĝin al mi dirante, ke ĝi estas ĉevalo, kaj sekve ĝia nomo fariĝis *Ĉevalo* – stranga, ekzotika, fabela nomo. Krom tiu materia memoraĵo ŝi lasis ĉe mi ankaŭ unu spiritan: francan lulkanton, de kiu mi nenion komprenis, tamen mi ŝatis ĝian ripetan formulon "et ron ron ron, petit patapon", kun la strangaj nazaj sonoj. Poste, kiel adolto, mi konstatis, ke ĝia teksto prezentas paŝtistineton, kies kato forlekas la laktan, pro kio ŝi ĝin mortigas. Strangan koncepton havas tiuj francoj pri lulkanto!

Somere mia fratino kaj mi ofte estis ekzilitaj kamparen al la geavoj, dum la gepatroj vizitis *Kongreson* – subkomprene- nite *Universalan*. Por mi tio signifis kelksemajnan atendadon, ke ili revenu hejmen, espereble kun ia donaceto el eksterlando. Neniam mi pardonis al ili la germanan ledan ŝorton alportitan el Mainz, kien ili por ŝpari monon iris bicikle mil kilometrojn. Alifoje ili tamen donacis platan ludilon, per kiu mi tirante ŝnuron povis ŝvebigi helikopteran rotoron aeren, kutime ĝis la pinto de unu el la pomarboj de mia avo. Poste mia fratino devis per rastilo helpi min alterigi ĝin. La ludilo estis el vera plasto, kio en tiu ora kaj fiera epoko signifi- sis apartan valoron.

Mi jam frue sciis diri en esperanto "bonan nokton" al la fremdaj gastoj (eble mi devus lanĉi la terminon "denaska bonan-nokton-esperantisto"?), sed super tiu nivelo mi nur kiel dek-sesjarulo lernis la lingvon, aŭtodidakte. Tio okazis, kiam la gepatroj decidis viziti Universalan Kongreson en Budapeŝto, kaj por la

unua fojo venigi kun si la infanojn. Tio povus ŝajni konvena momento por junulo eluzi la okazon por iom da junula libereco; mi tamen ne estis tiel matura, sed anstataŭe prenis tion kiel kaŭzon ekterni esperanton.

Dum kelkaj jaroj mi poste aktivis en la junulara esperanto-movado. Mia ĉefa merito – kvankam iuj eble trovus tiun vorton malĝuste elektita – estis redaktado de la revueto *Kvinpinto* dum mallonga sed intensa periodo. Mi tiam studis en la sveda universitata urbo Lund, la jaro estis 1969, kaj mi plonĝis en kirlaĵon el politiko, diskutoj kaj junulara ribelo. La redakta komitato kutime renkontiĝis ĉe Andreo, studento pri medicino, por krei numeron, kaj ni lasis lian ĉambron nur por akiri pli da biero kaj kolbasoj, ĝis la numero estis preta post meze 36 horoj. Unu el niaj numeroj eĉ estis recenzita – nur buŝe, sed tamen! – de neniu malpli ol la profesoro-doktoro Ivo Lapenna, kiu skuante sian montrofingron elspulis la historiajn vortojn: "Neta pornografaĵo!" Tio, paren- teze dirite, almenaŭ indikas, ke la profesoro-doktoro-aktoro pli bone konis internacian juron ol pornografion.

Kredeble liaj recenzoj ne estus pli favoraj, se li ekvidus la sekvajn numerojn de *Kvinpinto*, kiuj fariĝis ĉiam pli politikaj kaj umbilikaj. Oni perceptis sur ĝiaj paĝoj ombrojn de prezidanto Maŭ, kies saĝajn konsilojn mi strebis ensorbi el lia "ruĝa libreto". Ili ŝajnis al mi tre facile akcepteblaj; efektive ili pli-malpli identis kun skolta moralo kaj edifaĵoj el biblia lernejo. La leganto eble komentas, ke la praktiko de liaj ideoj ne estis tiel edifa. Prave, kaj tio prezentas alian koincidon kun la skoltaj-bibliaj ideoj...

Nu, post malmultaj jaroj da movadaj spertoj esperanto staris al mi en la gorgo. Pli grave tiam ŝajnis al mi ŝanĝi la mondon ol interkompreniĝi kun ĝi. Do, en la nomo de Maŭ, mi kviete kaj silente kabeis. Malfeliĉe – aŭ ĉu feliĉe? – ne daŭris longe ĝis mi sentis saman naŭzon pri la politika ondo!

Pasis kelkaj jaroj. Kiel junulo mi iam havis multajn plumamikojn en dudeko da landoj, sed mi ilin perdis, unu post la alia. Tamen en 1982 mi reakiris kontakton kun mia plej bona korespondamiko, Paŭlo el Brazilo. Dum kelka tempo mi uzis esperanton por kontakti tiun solan personon – iom ekskluziva lingvo! En unu letero Paŭlo demandis pri la fama sveda aŭtoro Strindberg: ĉu io de li troviĝas en esperanto? Mi sendis al li

ORDLISTA

(alla ordstammar finns i Plena Ilustrita Vortaro)

adolto vuxen
aludi antyda, anspela på
angilo al
atribui hänföra (till), tillskriva
aŭtodidakta självlärd
b.k. bildkarto = vykort
edifa uppbygglig
efemera kortvarig
ekzili förvisa
frivola lätt sinnig
gastroenterologo specialist på sjukdomar i matsmältningskanalen
kabei avfalla, plötsligt upphöra med all esperanto-aktivitet, som Kabe (Kazimierz Bein) gjorde 1911
kaporalo korporal
kapricio nyck
k.ĉ.l. kun ĉiuj landoj = med alla länder
koncepto upplåtning, begrepp
legera lätt, lättsam
liceo läroverk
manifestiĝo konkret yttring, yttre tecken
moruo torsk

Malmö Esperantoförening
Kronetorpsg 94
21227 Malmö

Esperantoförbundet, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

p.ĉ.t.
pri ĉiuj temoj = om
alla ämnesområden
percepti
förmimma
perturbo
störning, rubbning
pleŭronekto
flundra
retroiri
gå bakåt
rigora
sträng
riveli
framkalla, avslöja
sorbi
suga upp
stebo
stygn
umbiliko
navel

ĉion eldonitan, sed ĉar tio ŝajnis al mi ne bone speguli la vastan verkaron de nia aŭtora titano, mi aldonis kelkajn pecetojn, kiujn mi mem provizore esperantigis. Inter tiuj estis novelo nomita "Duona paperfolio", kiun mia amiko plusendis al la literatura revuo *Fonto*, kie ĝi efektive aperis. Per tiu duona folio de Strindberg mi do – malkabeis!

Vidinte en presita formo ion, kion mi tradukis, ambicio min kaptis, kaj iom post iom mi kutimiĝis al tradukado de prozo el la sveda lingvo al esperanto. Okaze mi esperantigis eĉ ion el la dana, norvega kaj angla. Mi spertis, ke laborante pri la traduko de literatura teksto oni akiras tre intiman rilaton al tiu verko, kaj mi komencis ege ĝui tian rilaton. Kaj kiel en aliaj intimaj rilatoj mi foje sukcesas, foje fiaskas, sed ĉiufoje tamen strebas kaj ŝvitias laŭ kapablo por samtempe kontentigi min mem kaj aliajn!

En la revuo *Fonto* mi povis legi ankaŭ originalaĵojn premiitajn en la *Belartaj*

Konkursoj de UEA. La nivelo de tiuj verkoj laŭ mia rigora juĝo ne estis grandioza, kaj mi tial ekhavis la ideon, ke eble eĉ mi povus konkuri kun ili. Ja neniu ekscios, se mi malsukcesos! En 1987, la jubilea jaro, mi verkis kaj alsendis du gravajn, profundajn majstraĵojn, kaj aldonis krome trian leĝeran rakonton. Kompreneble oni premiis tiun lastan, dum neniu atentis pri la du altkvalitaj noveloj! La samo ripetiĝis en la sekva jaro, sed tiam mi kreis nur unu seriozaĵon plus du amuzajn noveletojn. Ne necesas diri, kiujn oni premiis... Iom post iom mi devis adaptiĝi al la amara konkludo, ke la grandaj amasoj – nu, ĉio estas relativa; en tiu ĉi kazo temas pri la kvindekda esperantistoj sur nia terglobo, kiuj legas literaturon – do, tiu kvindekpersona amaso ne komprenas veran literaturan valoron, sed nur deziras leĝeran amuziĝon, kiu legeblas dum la televidaj reklamoj.


La supre menciita amiko Paŭlo bal-

daŭ ekrolis ankaŭ kiel mia korespondanta psikanalizisto. Li vere estas kuracisto, pli precize gastroenterologo, kaj de stomakaj malsanoj estas nur eta paŝo al psikaj perturboj kaj ties manifestiĝoj, kiel ekzemple esperantaj noveloj. Unu el miaj nepremiitaj ĉefverkoj, *La viro kiu restos*, laŭ mia propra supozo prezentis vojeton en arbaro kaj maljunulon, kiu atendas aŭtobuson. Sed per korespondanta psikanalizo mia doktoro pruvis al mi, ke ĝi efektive temas pri mi mem, same kiel ĉio alia, kion mi iam verkis, ekde *Renkontiĝo kun boaco* (la boaco estas mi) tra *Mia amata* (ankaŭ ŝi estas mi) ĝis *La heliko* (divenu, kiu estas tiu heliko!).

Post tia rivelado mi por ĉiam rezignis pri ĉia serioza verkado, kaj tiu konkludo estas la plej esenca, kiun mi ĝis nun sukcesis elgajni el tiu ĉi vivo. Tamen, *kiu vivos, tiu vidos*, kaj en ĉiu aĝo devas kreski la saĝo. Mi ankoraŭ ne iĝis malesperanto, eble ĉar mi estas la viro kiu restos!

Sten Johansson

KRUCVORTA ENIGMO



SOLVO DE 95/1

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H
1	K	R	O	K	O	D	I	L	A	S
2	R	I	P	A	R	A	S	■	R	E
3	I	V	A	N	O	■	T	R	O	N
4	P	E	L	T	■	A	M	I	N	D
5	T	R	O	I	G	E	■	S	A	
6	■	■	S	I	R	■	K	O	N	
7	G	A	S	T	■	P	A	R	K	
8	A	R	E	■	N	E	N	I	E	
9	M	O	N	■	K	U	R	T	■	
10	A	M	S	T	E	R	D	A	M	O

Horizontale

- 1 Insekta – Supre sur tigo (rad.)
- 2 Lernofako
- 3 Pec' de skribita teksto – Membron
- 4 Moskvaninon – Natrio
- 5 Ludkart' – Malsudo
- 6 Pli ol sufiĉe – Post lundo
- 7 Malgranda nombro – Trairejo
- 8 Povas paneo esti
- 9 Li estas pli ol stulta – Aloj' el fero kaj karbono
- 10 Duo kiu helpas kriplulon

Vertikale

- A Maldolĉa – Subdivid' de familio
- B Barila
- C Estis malgranda – Bruis pro gajeco
- Ĉ Lia vera nomo estis Uljanov – Fotografaj' mallonge
- D Finvorto – Deziro
- E Valoran pagilon
- F Flag'
- G Pingloarb' – Estas purigista laboro
- Ĝ Sankta bild' – Hundpromenad'
- H Ne fremdulo – Valora karto

Karlskoga sommarkurs

14 - 18 juni

Varje sommar arrangeras en sommarkurs med nybörjar-, fortsättnings- och konversationskurser. Deltagare och lärare från Sverige och utlandet. Sex lektioner varje dag. Tillgång till språklaboratorium för individuella studier. Vid kvällskaffet information, diabilder, video, sång och annan underhållning.
Kursledare: Lars Forsman

Karlskoga Folkhögskola
Box 192
691 24 Karlskoga
Tel. 0586-50360
Fax 0586-37077